

bulteno

**DE ESPERANTISTA KLUBO EN PRAHA
ĈE DISTRIKTA KULTURA DOMO PRAHA 7 -P**

N-ro 61

JANUARO - MARTO 1962

ESPERANTISTAJ VIKTIMOJ DE NAZIISMA OKUPACIO

Kvankam pasis jam pli ol 16 jaroj de post la fino de la dua mondmilito, ĉiam ankoraŭ ne estis punitaj ĉiuj el la krimuloj, kiuj famiĝis pro sia krueleco. Ofte ni legas iliajn nomojn en la ĵurnaloj. Nur kelkaj el ili estas juĝataj aŭ juĝotaj. La ceteraj sin kaŝas antaŭ la okuloj de justeco sub falsaj nomoj en lokoj nekonataj, aŭ en altaj, bone salajrataj postenoj, ekz. en Germana Federacia Respubliko, kie ili sin sentas bone ŝirmataj. - Ni esperantistoj NE FORGESU, ke inter la viktimoj de ilia furiozado estis ankaŭ multaj esperantistoj, kaj inter tiuj eĉ aro de gemembroj de Esperantista Klubo en Praha.

En la 58-a numero de nia Bulteno mi demandis, ĉu vivas samideano Bunzl, kiu dum la 13-a Universala Kongreso de Esperanto en Praha tiel bone ludis la rolon de ĉeĥa reĝo Karolo la IV-a en la teatraĵo "Nokto en Karlův Týn" de Jaroslav Vrchlický.

"Laŭ mia scio, revenis el hebreaj esperantistoj de Praha nur mi kaj iu Hirsch /nun Hanák/. Ĉiuj aliaj malaperis, inter ili kompreneble ankaŭ Bunzl. Ĉi tiun respondon ni ricevis de nia eksmembro Ota Ginz, nun vivanta en Kirjat Jam Bet en Israelo. Tiel ni sciigis, ke Bunzl estis hebreo, kion ni ne sciis. Sed krom verŝajne ĉiuj hebreaj membroj de nia klubo malaperis ankaŭ aliaj. Pri la nomoj de kelkaj ni rememoras. Iliaj portretoj en la rememoroj aperas antaŭ niaj okuloj: Weisskopf, Waldstein, Bloch kun la edzino, Flajšr, Lederer kun la edzino, f-ino Nasová, Ginz Petr kaj aliaj.

Ŝajnas, ke la listo de viktimoj ĉiam restos nekompleta. Ni penadas kolekti la nomojn - proksime de niaj ŝtatlimoj oni preparas kompletigon de la listo per novaj viktimoj.

NI NE FORGESU! J. Š.

El monata raporto de R. Heydrich por "Reichskanzlei" //16. 5. 1942/

"REGISTRIGO DE NACIECO

Sendepende de tiuj ĉi aranĝoj - kaŝita sub la motivo de enkonduko de la germana "Kennkarte" kiel enlanda pasporto - la registrigo de nacieco de la tuta loĝantaro de Bohemio kaj Moravio, kiu sola povas doni kompletan bildon pri la procento de tiuj, kiuj estas kapablaj por germanigo, estas aplikata laŭ la aĝogrupoj en kadro de la kuracista ekzamenado. Kvin moveblaj Roentgen-ekiparoj - el kiuj la unua jam eklaboris kune kun la "Kommando" starigita de la Ĉeĥa ofico por raso kaj loĝateco - submetos la tutan popolon al sistema ekzamenado kaj provizos sciencajn datojn bezonatajn por germanigo. La bezono de sistema batalo kontraŭ ftizo, kio servas kiel oficiala kovrilo, estas klarigata al la popolo helpe de ĉiuj rimedoj de propagando."

/El la libro "lesson from history", dokumentoj rilate al naziisma politiko de germanigo kaj likvido de ĉeĥa popolo dum la okupacio. - Orbis, Praha 1961./

La novaj revenĝistoj, kiuj revas pri reveno de tiuj oraj tempoj, devas kalkuli kun la fakto, ke la popoloj, suferintaj sub ilia kontraŭhoma ordo, neniam forgesos, ĉar ne temas nur pri iu ideologio, sed pri simpla vivo de nacio entute. -jmh-

AKTIVECO EN NIA KLUBO

La aŭtunan sezonon en nia klubo ni malfermis la 6-an de septembro per vespero, dediĉita al

Vjetnama Demokratia Respubliko. La 13-an de septembro Fr. PYTLOUN /Poděbrady/ rakontis aŭtobiografie interesaĵojn el la vivo de esperantisto. La 20-an de sept, ni aŭdis aktualan prelegon pri la revolucia Kubo, speciale por ni verkitan de E. Juarez Sedeño "Kubo, mia patrujo". D-ro J. JERMÁŘ, prezidanto de ĈEK, pritraktis la 27-an de sept. la historion de la Munkena diktaĵo /1938/ laŭ jura flanko, demonstrante ĝian juran senvalidecon. "Vespero de internacia amikeco" okazis la 16-an de sept. /vidu apartan raporton/. Komuna vizito al la ekspozicio "40 jaroj de KPĈ" okazis dimanĉe la 24-an de septembro.

En oktobro ni aŭdis du prelegojn /la unuan kun koloraj lumbildoj/ de d-rino R. SCOLNIK pri sia patrujo, Argentino. La 18-an de okt. prelego pri vojaĝo en Afriko. La 25-an de okt. d-ro PUMPR en "Esp. gramatiko kiel logika sistemo de normoj" klare montris la eraran konvinkon de iuj "ata-ita-ism-anoj".

La 1-an de novembro Inĝ. J. WERNER tre interese rakontis, laŭ nia invito, pri "Konstruado de la Orientslovaka ferfabrikaro", kiun li partoprenas. Okaze de la "Monato de ĉs.-soveta amikeco" niaj membroj aŭdis: la 8-an de nov. de MÍČOVÁ kaj kolektivo bone elektitan kaj prezentitan programon je okazo de la Granda Oktobra Socialisma Revolucio, kiun sekvis /magnetofona/ prezento de spirita donaco kaj salutoj de la pragaj esperantistoj, senditaj al esperantistoj sovetaj. La membroj krome sendis kolektivajn salutleterojn al la moskvaj esperantistoj kaj individuajn salutojn al Leningrado: la lastajn disaŭdigis la urba radio en Leningrad. Ni sendis ankaŭ kolektivajn leterojn al la patro de la dua kosmonaŭto, Titov, kiu estas esperantisto. I. SEVERA surprizis nin la 22-an de nov. per altnivela prelego "Flugado alimonden - la eblecoj kaj malfacilaĵoj". - La 15-an de novembro J. CÍCHOVÁ: "Popolaj kantoj de Japanujo", kun uzo de originalaj diskoj ĵus ricevita el tiu lando. En kadro de "Prisana zorgado en ĈSSR" la 29-an de nov. d-ro J. ČERNÝ /Litoměřice/ katenis la atenton de ĉiuj per prelego "Obezo kaj ĝiaj influoj je la sano".

La 6-an de decembro M. RUDOLF sub titolo "Soveta flago en Antarktido" konigis al ni la sciencajn konkerojn en la glacia kontinento. Zamenhofa vespero estis la 13-an de dec., preparis MÍČOVÁ kaj URBANOVÁ. La 20-an de dec. - "Japana poezio" kun muziko, preparita de J. CÍCHOVÁ. Kaj la lasta vespero en tiu ĉi jaro, la 27-an de decembro estis dediĉita al "Gaja jarfina programo" - preparis A. SLANINA.

EN JANUARO: 1. "Tragedio en la Universo - averto al la atomaj hazardistoj". - 2. D-ro J. JERMÁŘ: instrukcia prelego pri aktiveco de la esp. rondetoj kaj pri agado de ĈEK. - 3. Libera tribunalo. - 4. Poezia bukedo /E. URBANOVÁ/. - 5. Originala prelego pri Cejlono /J. CÍCHOVÁ/.

EN FEBRUARO: - 1. "Konflikto" /pri bulgara batalo kontraŭ restoj de la analfabetismo/. - 2. "La formoj de vulkanismo" /Kafka/. - 3. "14-a datreveno de la venko de l'ĉs. labor. popolo". - 4. "Konkero de Fitz Roy", geografia interesaĵo. - Libera tribunalo.

VESPERON DE INTERNACIA AMIKECO

aranĝis sabate 16. 9. 1961 nia Klubo en sia klubejo. Ke la vespero estis vere interpopola, atestas la ĉeestantaro: docento Viktor GRUŠKO el Rostov-Don /USSR/, kuba diplomato Ricardo TORRIENTE kun sia edzino Dolores GARCIA TORRIENTE, s-ino Irene POCZOBUT el Varsovio kaj hungara ĵurnalisto L. KULCSÁR /Győr/. Venis ankaŭ gastoj el Poděbrady, Kolín kaj Ostrava. Post paroladoj, pruvantaj la aspiron de ĉiuj bonestaj homoj pri paco kaj amikeco, prezentis sin sovetiaj esperantistoj per esperantlingvaj kantoj, deklamado kaj muziko pere de magnetofona bendo, donacita al nia klubo. Poemojn de Kalocsay recitis. N. Rytjkov, membro de la Komsomol-Teatro en Moskvo. Niaj membroj kontribuis al la programo per prezento de magnetofona programo, dediĉita al sovetiaj esperantistoj: J. Cíchová /parolakompano/, E. Urbanova /recitis siajn poemojn/, d-ro P. Sádlo-Páv /violonĉela koncerto/.

VIZITO EL INDONEZIO. Nian urbon vizitis en septembro Hatoe Toemeggoeng, prezidantino de la Indonezia Esperanto-Asocio. A1 Praha ŝi venis el Brno, kie ŝi partoprenis la Internacian Foiron en oficiala indonezia ekspozicio.

SUPER LA LERNOLIBRO DE ESPERANTO DE THEODOR KILIAN

La longe atendita kaj sopirata ĉeĥlingva lernolibro de Esperanto kompilita de prof. Theodor Kilian en tria aŭgusta semajno aperis en la vendejoj. Sed ĝi ekflamis nur kiel aerolito sur la ĉielo de nia movado, ĉar ankoraŭ samtage ĝi estis en la librovendejoj elvendita. La vendejoj ricevis po 5 ĝis 10 ekzempleroj, ĉar la eldonkvanto por la tuta respubliko estis nur 3000 pecoj. Tiel ekz. vendejo proksime de stacidomo en Brno ricevinta 4 pecojn, dum ĝi estus laŭdire bezoninta 400 pecojn, forvendis ilin dum unu horo. El tio rezultas, ke, se ne aperos posteldono, la aŭtunaj kursoj estos ree sen lernolibroj.

Post tralego de la lernolibro mi konstatas, ke ĝi estas bone kaj faksperte verkita kaj mi konsideras ĝin plej bona lernolibro el la ĝis nun en ĉeĥa lingvo aperintaj. La lecionoj /20/ estas tre ampleksaj, kun abunda tradukmaterialo, kun kontroltekstoj, konversacio, klare eksplikita gramatiko, lecionvortaretoj. La lecionoj havas aktualajn temojn, korespondhelpajn letermodelojn, kaj tio kune kun amplekga legolibra parto kaj relative sufiĉe riĉa Esperanta-ĉeĥa kaj ĉeĥa-Esperanta vortaro povas la lernantojn provizi per sufiĉa kvanto da bezonaj esprimoj. Laŭdinda estas ankaŭ la konciza klarigo de fonetikaj reguloj, precipe koncerne la longecon de akcentitaj vokaloj, kion ĝis nun bedaŭrinde la aŭtoroj neglektadis. Tial ĉi tiu lernolibro taŭgas ankaŭ tre bone por aŭtodidaktaj. Ankaŭ grafike ĝi estas tre bone aranĝita kaj kelkaj celtaŭgaj ilustraĵoj helpas la klarigon. En la 273-paĝa duontole bindita libro mi trovas sole du preserarojn /p. 188 Lud. Poděšť, p. 227 mini dolovati/.

Eĉ tre severa recenzanto ne povas en la unua eldono trovi multon plibonigindan, kompletigindan. Sed ĉar tiu ĉi bonega lernilo certe baldaŭ havos pluajn eldonojn, mi vokas ĉi tie iom pli detale atentigi pri kelkaj plibonigindaj punktoj.

En la naŭa leciono inter la riĉa parenkarco de la familio Ĉech estus por kompleteco bofilo aŭ bofilino enplektebla. Sur p. 55 devus, por ĝuste komenti la bildon, teksti: tuj poste li saltas trans la barelon. Ĉar ja io diferenca estas "infanoj saltas trans la barelo" kaj "infanoj saltas trans la barelon". Kvankam la Plena Vortaro citas ankaŭ inter kunakuzativaj Zamenhofaj kaj aliaŭtoraj frazoj unu lokŝanĝan sen akuzativo, tamen kaj la Plena Gramatiko kaj la nuna ĝenerala uzo postulas ĉe lokŝanĝa movo akuzativon. Sur p. 61 ĉe prepozicio "da" mi rekomendus aldoni simplan klarigan frazon "Per -da- oni mezuras nur el nedifinita materialo. Se ĝi estas difinita per la artikolo aŭ alia montra pronomo oni uzas -de-". Ekz. Iom da bona kafo. Sed: Iom de la bona kafo, iom de tiu bona kafo. P. 79, por "honesta" mi tamen lasus la ĉefan signifon "počestný, poctivý", kiel estas en la vortareto sur p. 220, kaj la subkompreneblan signifon "slušný" mi aldonus dualoke. Same s. p. 84 "teĥnika" mi unue tradukus "technická" - zde průmyslová. S. p. 90, 88 mi "servouniformo" preferus anstataŭi per "deĵoruniformo". P. 90 k. ĉie en la leteroj, ankaŭ en la legolibra parto, mi rekomendus forlasi la ĝentilecan majuskligadon de la pronomo Vi, Via. Ĝi estis uzata, kaj eĉ ne tro konsekvence, en komenca periodo de Esperanto, sed estis ĉiam pli forlasata. Hodiaŭ ĝin uzas nur tre malmultaj kaj ankaŭ la Plena Gramatiko malrekomendas ĝin, same kiel majusklon ĉe la nomoj de nacio: ĉeĥoj, rusoj ktp. Cetere ankaŭ en la naciaj lingvoj la kutimo estas diversa: ekz. angloj majuskligas en leteroj pronomon de la unua persono. P.90 balailo - koěť, aldoni smeták. P. 91, 128 ĉe sufikso -isto aldoni: těž stoupenec hnutí, učení nebo sportu: komunisto, anarĥisto, futbalisto, hokeisto, ŝakisto. P. 96 en frazo "De Třebíč tra Praha kaj Plzeň ĉi tien ĝi estas proksimume 400 km" estas preferinde forlasi "ĝi". P. 111 "Joĉjo inde ignoras la mokan rimarkon" tekstu "Joĉjo digne. . .". P. 118 en frazo "Mi venis, por redoni al vi libron" forfalu la komo. P. 162 kaj aliaj artikoloj pri nia ĉefurbo evitas sisteme la Esperantan formon Prago, kiu estas paralele uzebla apud la nacia formo, kaj havas krome avantaĝojn de oportuna almeteblo de sufiksoj. La malŝateco al la radiko Prag' estas neniel pravigebla, ĝi estas praslava vorto kaj ni trovas Praga en rusa, pola, serbokroata lingvoj, ĝi estas en la latina kaj en ĉiuj mondlingvoj. Sekve ĝi estas plej internacia. En ampleksaj Esperantaj tekstoj oni do preferu la Esperantajn loknomojn, kie ili ekzistas, ekz. Parizo, Vieno, Varsovio, Vistulo, Moskvo, Prago kaj la naciajn formojn oni rezervu por adresaj notoj k. s. P. 167 "situata" oni anstataŭigu per "situanta", ĉar situí estas netransitiva verbo kaj ne estas motivo uzi ĉi tie licencon

rezervendan prefere por poezia neceskazo, nome laŭ regulo pri sufiĉo kaj neceso ellasi el la vorto sufikson -ig- ĉe pasiva participo. P. 173 apud la formo "gobeleno" jam Wüster, kaj nove Waringhien /ankaŭ Filip/ preferas la formon "gobelino". P. 211, aĉa estas unuavice aspekta redukto, do prefere tradukenda per "ŝeredný, ohavný". P. 212, anso - aldonu "klika u dveří". Arbitra - "svévolný", blasfemi - aldonu "klíti", bleki - aldonu "vydávati zvířecí zvuky" /meĉeti - meki, kapobleki/. P. 214, brui - unue "hluĉeti", p. 217, farmi - kompletigi: najmouti půdu, hospodářství, p. 232, rampi - aldonu "lézti" /ne však šplhati/-, rezisti - aldonu "odolávati", p. 234, specimeno - aldonu "vzorek", p. 249 ĉe "koule"- globo, kuglo: kraj - rando, regiono, kaj en aliaj similaj kazoj, kie pli-malpli diferencaj signifoj viciĝas apude eĉ ne per punktkomo dividitaj, estus konsilinde eĉ en tia malgranda helpa vortareto per koncizigo klarige helpi la komencantojn ĉe vortelektio, ekz. koule - globo, /střela/ - kuglo. P. 258, razítko - aldonu unue stampo, /nástr. stampilo/, rmoutiti - aldonu aflikti, p. 259 salam - aldonu "salamo" /P. V.-suplemento/, skutečný - aldonu "reala", p. 260 služba - aldonu "deĵoro", směti - rajti, darfi /"povi" forlasi/, stonek - aldonu "tigo", p. 261 šaty - aldonu: ženské "robo", p. 265 vkus - aldonu "belgusto", p. 265 vlhký - aldonu "humida", p. 266 vzdorný - aldonu "spita" /obstina - tvrdošijný/, p. 268 enmetu: zkusit - provi, p. 269 žalář - aldonu "karcero", žebřík - "eskalo" /P. V. - suplemento/.

Estas dezirinde, ke la nova modela kaj moderna lernolibro baldaŭ aperu en pluaj kaj pli grandaj eldonoj, kiel respondus al la granda intereso de la publiko kaj al bezonoj de niaj kluboj kaj rondetoj.

Jiří Kořínek



Ne estas mia kulpo, ke dum la "ekskurso", kiun ni entreprenis el nia biblioteko en la pasinta numero de nia Bulteno, ni ne faris pli ol eble 50-60 paŝojn. La ĉirkaŭaĵo observata el la loko, kiun ni ĝisiris, donis al ni tiel abundan historian materialon, ke hi povus pri ĝi mediti, paroli kaj diskuti dum longaj horoj. La senpera proksimaĵo de Týn, kiu jam en la naŭa kaj deka jarcentoj servis al komercado, transportis nin en tiun antaŭmiljaran tempon. Vigla trafiko regis ĉi tie. Ĉi tien venadis komercistoj el oriento kaj okcidento, el nordo kaj sudo por vendi aŭ interŝanĝi siajn varojn. Ili pagis doganon el siaj varoj, kiujn ili povis ĉi tie deponi. Kaj ili ĝuis protekton, ĉar Týn estis fortikigita kaj havis gardistojn. Inter la fremduloj, kiuj ĉi tiun lokon en la deka jarcento vizitis kaj ĉi tie konatiĝis kun Praha, estis ankaŭ araba hebreo Ibrahim Ibn Jakub, komercisto, kiu postlasis la plej malnovan skriban dokumenton pri Praha kiel urbo. Ibrahim Ibn Jakub arabe priskribis siajn vojaĝojn tra kelkaj eŭropaj landoj. Tiam, antaŭ mil jaroj, oni ne multe zorgis pri tiaj verkoj, sed estis bona kutimo konservi ilin en la biblioteko. Feliĉe ankaŭ ĉi tiu verko estis retrovita post pli ol 900 jaroj ie en Turkujo. El araba lingvo tradukis ĝin pola sciencisto Ed. Kowalski, kies laboron poste uzis I. Hrbek, por transdoni ĝin ankaŭ al la ĉeĥa nacio.

Ibrahim Ibn Jakub ekzemple skribas:

/Inter krampoj troviĝas komentoj al la originala teksto/ "La slavaj landoj etendiĝas ek de Sirta Maro /Maro Mediteranea/ ĝis oceano en la norda direkto /Balta Maro/. Iuj gentoj de nordo perforte okupis iliajn landojn kaj restadas inter ili. Inter la slavoj estas multaj diferencaj triboj. Iam, en la pasintaj tempoj, ili estis unuigitaj sub unu reĝo, kies titolo estis Máĥa. /Ĉi tiun titolon oni ne sukcesis ĝis nun klarigi. / Tiu reĝo devenis el gento nomata Velitábá. /Sendube temas pri kripligita

araba transskribo de nomo Velináná - Volinanoj. / Ĉi tiu gento estas de ili tre ŝatata kaj respektata. Poste ili malpaciĝis inter si, kaj tiel malaperis ilia antaŭa unueco. La gentoj poste formis diversajn grupojn. Super ĉiu gento regas ilia reĝo. Nun ili havas kvar reĝojn: reĝon de Bulgaroj, reĝon Bujislav /Boleslav II, 967-999/, reganton en Praha /en la originalo ni legas Frágá/, Bohemio kaj Krakovo. Plie ili havas reĝon Meŝko /pola Mieszko I, 960-992/ reganton de la nordo, kaj reĝo Nakún en la plej norda parto estas princo de Obodritoj /954-96?/".

Pri la Ĉeĥoj, Bohemio kaj Praha parolas Ibrahim jene:

"Koncerne la landon de Boleslav: Ĝia longeco, de la urbo Praha ĝis Krakovo, egalas al vojo de tri semajnoj kaj najbaras kun lando de la Turkoj /Hungaroj/.

La urbo Praha estas konstruita el ŝtono kaj kalko kaj estas la plej granda urbo de komerco. Venas ĉi tien el la urbo Krakovo Rusoj kaj slavoĵoj kun la varo, kaj el landoj de Turkoj venas Muzulmanoj, Hebreoj kaj Turkoj /Hungaroj/ ankaŭ kun varoj kaj komerca nomo. Ili eksportas de ĉi tie sklavoĵojn /aŭ farunon? - la malnova araba lingvo uzas por tiuj du malsamaj ideoj nur unu esprimon/, stanon kaj diversajn felojn. Ilia lando estas la plej bona lando de nordo kaj plej bone provizita per nutraĵo. Por unu kirato /0, 212 gr/ oni aĉetas tiom da tritiko, ke ĝi sufiĉas al homo por tuta monato. Kaj por la sama prezo oni vendas tiom da hordeo, kiom sufiĉas al rajdanto por kvardek tagoj, kaj krome por tiu kirato dek kokinojn. En la urbo Praha oni fabrikas selojn, bridojn, kiaj estas en ĉi tiuj landoj uzataj. En la lando de Boleslav estas fabrikataj ankaŭ delikataj tuketoj el maldika teksaĵo, simila al reto, kiuj servas por nenio. La valoro de ili estas jena: dek tuketoj por unu kirato. Tiuj tuketojn oni uzas ĉe la komercado por pagi per ili. La tuketoj formas ilian havaĵon kaj valoron de ĉiuj objektoj. Por la tuketoj oni akiras tritikon aŭ farunon, ĉevalojn, oron, arĝenton kaj ĉion ceteran. Nekutima afero estas, ke la civitanoj de l' lando de Boleslav estas brunetaj kaj nigraharaj, dume tipoj blondaj estas inter ili maloftaj. "

En aliaj partoj de sia verko Ibrahim Ibn Jakub parolas pri la slavoĵoj ĝenerale:

"La slavoĵoj entute estas kuraĝaj kaj heroaj. Kaj se ili ne estus dividitaj je multaj gentoj kaj apartaj grupoj, neniu nacio venkus ilin per sia forto. Ili loĝas landojn plej riĉajn en senco de fekundeco kaj plej bone provizitajn per nutraĵo. La slavoĵoj sin diligente dediĉas al terkulturado kaj al fabrikado de objektoj bezonataj por la vivo, en kio ili superas ĉiujn popolojn de nordo. Iliaj varoj per seka kaj mara vojoj migras al Rusujo kaj al Konstantinopolo. En neniu el la nordaj landoj okazas malsato sekve de manko de pluvo aŭ longeco de seka vetero. Male, ĝi aperas pro abundo de pluvo kaj pro daŭra amasigo de akvo. Seka vetero ne estas ĉe ili pereiga, ĉar neniu, kiu per ĝi estas trafita, timas ĝin, pro sufiĉa malsekeco de ilia lando kaj granda malvarmo. La semadon ili faras en du jarsezonoj, somere kaj printempe, kaj ili havas du rikoltojn.

La slavoĵoj sin vestas per larĝaj vestoj, sole la manumoj de la manikoj estas mallarĝaj. En ilia lando vivas stranga birdo, verda surdorse, kiu ripetas ĉion, kion ĝi aŭdas de homoj kaj bestoj. En la slava lingvo ĝi nomiĝas sba. /Temas verŝajne pri sturno, ĉeĥe nomata špaček, pole szpak. / Krome vivas tie ankaŭ sovaĝa koko, kiu nomiĝas slave tetra /tetraego/. Ĝi havas bongustan viandon kaj ĝian voĉon oni povas aŭdi en distanco de parasango /araba longunuo, mezuranta 5762 m/. Ekzistas du specoj. Nigra kaj multkolora. Tiu estas pli bela ol pavo. La slavoĵoj havas diversajn specojn de kord- kaj blovinstrumentoj. La longeco de unu el tiuj blovmuzikiloj estas pli ol du kubutojn. Korda instrumento havas ok kordojn kaj ĝia malsupra disko estas plata. Ilia trinkaĵo estas vino kaj mielo. . . "

Tiel kaj simile skribas pri nia lando kaj pri niaj antaŭuloj Ibrahim Ibn Jakub antaŭ plena jarmilo. Estas nefutebla fakto, ke tio, kion li skribis, eĉ se temas nur pri priskribo mallonga, bonege dokumentas, ke Praha en tiu tempo estis jam urbo granda, riĉa kaj vivoplena. Ibrahim Ibn Jakub trairis multajn urbojn de Eŭropo. Li do certe povis kompari siajn impresojn el Praha kun tiuj, kiujn li havis pri aliaj grandaj urboj de okcidento kaj sudo.

/Daŭrigota/

NI RECENZAS

La eldonejo de Fremdlingva Literaturo en Sofio eldonis komence de jaro 1961 aktualan broŝuron: Todor Ĵivkov, "Triumfu la politiko de paco kaj paca kunekzistado, oni metu finon al la kolonia jugo". Ĝi estas kolekto de paroladoj, raportoj, interparoloj kaj eldiroj de la unua sekretario de la Bulgara Komunista Partio konekse kun la 15-a Sesio de la Asembleo de UNO. 168 p. , 14x20 cm. Prezo: ne indikita. En la libro respeguliĝas la pacaj aspiroj de la bulgara popolo en la politiko enlanda kaj internacia. /Pruntebla en la esp. biblioteko. /

Novan esperantistan marŝkanton "Per Esperanto por la Mondpaco" publikigis kun muziknotoj la vietnama eldono de "Paco" /junio 1961/. Verkis ĝin ĉeĥoslovakaj aŭtoroj Bohuslav Střítecký /muziko/ kaj Ernesto Baláš /teksto/.

NOVA EZOPO

Mi havas la plezuron raporti pri literatura novaĵo tute freŝa. En la fama kaj meritplena eldonejo Stafeto de Juan Régulo Pérez /La Laguna, Kanariaj Insuloj/ ĵus aperis kiel naŭa en la serio "Beletraj kajeroj" poemlibro, kiu nin, pragajn esperantistojn, devas tre interesi: "NOVA EZOPO" de nia Stefo Urban. Sur 128 pagoj de la konata poŝformato en neta tipografia aranĝo paradas 76 poemoj kaj poemetoj, akompanataj de ok sprite gagaj ilustraĵoj de la pentristo Jaromir Skřivánek. Poul Thorsen en la antaŭparolo nomis la idojn de la Muzo de Stefo Urban: grandioza bagatelaro. La moderna filo de la antikva Ezopo uzis la hereditan formon de konciza, nekomplika versaĵo /plejofte estas nur strofoj po kvar dutrokeoj/ por traĥe eldiri spritan kapvenan ideon aŭ eĉ malnovan, ĝenerale konatan veron. La ezopa saĝo ne solvas ja problemojn. Ĝi glosas kaj komentas. Ĝi flosas super la profundaĵoj de la grandaj demandoj kiel ŝaŭmo super la maro; jen kun ridetanta netruda mentorado, jen kun pik-pika ŝercado, jen kun seka konstato. Tiu ĉi ĝenro estas konvena al Urban, kiu ŝatas surprize formulitajn kaj vortŝpare lakonajn propoziciojn, ofte sen predikata verbo, tiel ke la leganto - ve! - iam eĉ devas pensi.

La plejparto de la poemetoj estas el la speco de la tradiciaĵ "bestaj fabloj"; tamen la moderna tempo alportis ankaŭ novan temaron, tiel ke ne mirigas nin, se ni trovas ekzemple fablon pri aŭtomobilo, pri aeroplano, pri alumeto aŭ pri luksa lustro.

El la ezopaj temoj elglitas kelke da ludaĵoj, kiuj estas pli vortornamoj ol priaferaj poemoj.

Kaj nun legu specimenojn el la "Nova Ezopo":

SPEGUEO

Spegulo montras
nur eksteron,
kaj prisilentas
karakteron,

ĉar ofte iĝus
abomene,
se montriĝus eĉ,
kio ene!

BIBLIOTEKO

De la libroj
longa vico
moke ridas
kun malico:

Laŭ la tuta
kilometro
ne legita
eĉ ĉapitro!

Rigardata
kun la indo
estas sole
leda bindo.

SPONGO KAJ KRETO

Al spongo turnis sin la kreto;
Vi ĉion de sur tabuleto
viŝadas. Pli ol profesoro
vi devas havi en memoro!

La spongo diris: De l' instruoj
nenio restis - pro la truoj.
Kaj ĉe la homoj tre simile:
multegaj sobras - neutile.

La 46-an Universalan Kongreson de Esperanto - 5. -12. 8. 1961 - en la angla kongresurbo Harrogate partoprenis ĉirkaŭ 1500 personoj el 55 landoj. El socialismaj landoj la hungara registaro estis reprezentita de S. Toth. La kongrega rezolucio diras i.a., ke montriĝis la kondiĉoj por subskribo de Interŝtata Konvencio pri laŭregula enkonduko „de Esperanto en lernejojn de pluraj ŝtatoj. Unuafoje okazis internacia arta festivalo. En Internacia Belarta Konkurso ricevis unuan premion en fako originala prozo ĉeĥoslovaka esperantisto Vladimír Váňa kaj honoran mencion en originala poezio ĉeĥoslovakoj Eli Urbanová kaj Jiří Kořínek.

La estraro de UEA sendis saluttelegramon al la patro de la dua kosmonaŭto S. P. Titov, kiu estas esperantisto.

V I V J U B I L E O J

En la dua parto de la jaro 1961 festis jubileajn naskiĝdatrevenojn kelkaj niaj membroj kaj aliaj:

La 10-an de aŭgusto František BUHR fariĝis 65-jara; la 4-an de oktobro Zdenka KAMARÝTOVÁ – 70-jaraj, la 2-an de novembro Otto SKLENČKA – 70-jara; la 4-an de novembro Berta PRŮŠOVÁ – 75-jara; la 30-an de novembro Hedvika GOBELOVÁ - 60-jara; la 6-an de decembro Jaroslav ŠUSTR - 60-jara; la 9-an de decembro profesoro Jan FILIP - 50-jara; la 15-an de decembro Jan Ev. SLÁVEK - 65-jara; la 26-jn de decembro Štěpánka ŠUMAVANSKÁ - 70-jara.

Al ĉiuj ni elkore deziras, ke ili ankoraŭ multajn jarojn vivu inter ni.

En julio 1961 edziĝis nia amiko Dipl. sin. Erich Dieter Krause en GDR al f-ino Sonja Popova. Ni sincere gratulas!

N I F U M E B R A S

En Praha forpasis la 4-an de julio s-ino Marie CIMROVÁ, 73-jara, esperantistino de la jaro 1910. Ŝi estis aktiva en iamaj rondetoj de esperantistinoj, de poŝtoficistoj, en la Kongresa poŝtoficejo /1921/, instruis Esperanton, tradukis kaj dum multaj jaroj partoprenis eldonan laboron.

František HEIKENWÄLDER mortis en Prostějov la 11-an de oktobro 1961 en la 63-a jaro de sia vivo. Antaŭ la dua mondmilito li estis prezidanto de Esperantista Klubo en Prostějov kaj eldonanto de LIGILO, kiu dum aro da jaroj servis al la ĉeĥoslovaka esperantistaro kiel ĝia ŝatata esperanta gazeto. Per sia diligenta kaj oferema laboro li profunde sin enskribis en historion de la Esperanto-movado en nia lando. Al liaj edzino kaj parenkaro nian profundan kondolencon!

Tragedie mortis nia germana amiko prof. D-ro Georg SORGEL el Quedlinburg GDR. Lia filino Ute informis nin, ke ŝia kara patro falegis kun sia velglisilo el 400-metra alteco. Li estis entuziasma aviadisto. Nian sinceran kondolencon al lia familio.

VI SKRIBAS-----NI RESPONDAS

S-ino Ivanka KALUDČÍĜ, Jugoslavio - ni ĝojas por via poŝtkarto. Vian adreson ni transdonis. Baldaŭ vi ricevos respondon.

S-ano John TRYGX, Svedio - koran dankon por via rememoro kaj multan sukceson!

S-ano Johan DALASTJAN, Hungario - dankon por via poŝtkarto. La devo batali por paco estas komprenebla por ĉiu esperantisto.

S-ano Laszlo TOLNAI, Hungario - ni tre dankas por via sincera skribo. Salutu de ni anojn de via grupo kaj vi mem kreu, ke ankaŭ via deziro viziti Ĉeĥoslovakion, baldaŭ plenumiĝos.

S-ano Aleksandro KAJTI, Hungario deziras al vi baldaŭan resanigon kaj plenan feliĉon rilate al Esperanto.

S-ano GLŠCKHER, Germanio. , /GDR/ - kiel vi certe konstatis, nia Bulteno estas multobligita. La malgranda litertipo estas uzata por ŝpari la paperon. Vian viziton ni ĝoje akceptus.

S-ano Jurij KIVAJEV, Kujbišev -USSR – ni esperas, ke via anonceto akiris al vi korespondantojn.
S-ano REZNICUK, Sarkov-USSR - ni komune batalas por paco kaj Esperanto estu ilo, per kiu la
homaro interkompreniĝu en tiu ĉi nobla celo! Dankon por la Bildo de Gagarin!
Nguyen-manii-Chuong, Hanojo-Vjetnamio. Ni dankas por la serio de interesaj poŝtkartoj. Interesis
nin precipe la oficiala preso en Esperanto sur ili.

VIZITIS NIN EKSTERLANDAJ GESAMIDEANOJ

Dum lastaj kvin monatoj vizitis nian ĉefurbon entute 84 gesamideanoj el 18 landoj. Multaj el ili partoprenis niajn klubajn kunvenojn kaj vizitis nian bibliotekon. La aliaj nur traveturis la urbon, sed tamen ni sukcesis interkonatiĝi kun ili almenaŭ por kelkaj horoj.

De la 7-a de junio ĝis la 24-a de novembro 1961 ni notis 26 gesamideanojn el POLLANDO, 16 el HUNGARIO, 11 el BULGARIO, 5 el SVEDIO, 3 el DANUJO, 3 el USSR; po 2 gesamideanoj el ANGLUJO, FRANCIO, ITALIO, KANADO, KUBO, NEDERLANDO, SVISLANDO, USONO; po unu samideano el ARGENTINO, GDR, GFR kaj JAPANUJO.

ESPERANTAJ POŝTKARTOJ

Serion de esp. poŝtkartoj kun temoj el metalurgia industrio kaj okaze de 40 jaroj de Komunista Partio de Ĉeĥoslovakio eldonis la Esperantista rondo ĉe feruzinoj VŘSR en Třinec.

„Ilia aranĝo meritas kelkajn riproĉojn: certe estus utile la venontan fojon konsulti ĈSEK antaŭ similaj eldonoj.

Ekzemple uzado de la litero —Ř— en nomo TŘINEC estas tute erara!

DEZIRAS KORESPONDI:

BULGARIO:

Esperantista Societo "ALBATRO", p. k. 11, Varna, Bulgario, dez. kor. lkn la tuta mondo pri ŝipmodelismo, meblismo, sporto, literaturo ktp.

= B. NIKOLOV, kv. Republika 18-11, Bliven Bulgario, dez. inters. kun la tuta mondo Pl, il. PK, alumetikedojn, gazetojn.

= TEDOEKA PETKOVA, str. Veliko Tarnovo n-ro 2, Gabrov2, Bulgario, 18-jara f-ino dez. Kor. kun ciuj landoj pri ĉ. teinoj. = Kursanoj de Dimitr Ivanov el Ruse, ĉe entreprenoj "Prenos-Prevoz"/Trans- porto-Veturigo/ kaj ŝtata Asekur-Ins- tituto-Ruse, dez. kor. kun c. l. per BK, leteroj filg. tele afrankitaj, fotoj kaj aliaj intersanĝoj :ARTOANETA AliTOEOVA, 17-jara stuĉentino, "H. Rilski"20, Ruse; STOJARKA KOCEVA, 18-jara, studentino, str. General Skobelev 42, Ruse; LIDIJA KOVAC EVA, 22-j ara ofic ist ino, str. 3t an ke Dimitrov 18, Huse;VEL^CKA TATAROVA, 25-jara^Prenos-Prevoz^agencia n-ro 3 bulv. Saedinenie 13a, Ruse; AHGELIKA 8IM. IVAH0VA, 23-jara oficistino, str. Asparuh 28, Ruse;SVGENIJA T0D0R0VA, 25- jara oficistino, Bulv. "Car Osvobodi- tel" 50, Ruse; KSVJANA SJAR0VA, 25-jara oficistino, str. "D. Korsakov"10/ II, Suse KSERIJA KIPEĜIEVA, 47-jara oficistino, str. "General Skobelev"36, Ruse ;REDEIOO VAS. D0ĜSV, 23-jara soforo, Bulv. "Tutra- kan"n-ro 32, Ruse;IVAR IVAEOV, 30-jara ĝenerala kontisto, str. "Dimitr Blagoev" 31, Ruse; PETRO 3IRAK0V, 35-jara oficisto, str. "Al. Atanasov"n-ro 15, Hu- se; ĤRISTO D. ĤRISTOV, 36-jara, normig- anto, str. Gen. Skobelev 47, Ruse; 3PA3 PAEOV, juristo, 32-jara, str. Gen. Stole- tov, Ruse; DI"ITR IJLATEV 30-jara, Doma- kin de "Prenos-Prevoz", str. Carkovna Eezaviŝimost 5, Ruse.

= IVAE POMAKOV, "Otec Paisij" 3, Ruse, deziras korespondi kun c. l. ,

H U E G A R I O :

= JUHASZ GABOR. , Sarkad, IV. Hajdu u. 34, Hungario, deziras korespondi.

J U G O S L A V I O :

= PECKA MARIJA, Jakŝiĉ, Slav. Pozega, Ju- goslavio, 17-jara lernantino dez. in- terŝanĝi

bildkartojn.

P O L L A N D O :

= HORKX JAEIEA, Kanczuga, pow. Przewiosk, woj. Rzeszów, Pollando, 4b-jara s-anino, dez. kor. pri litgratugo, filmo, muziko, floroj kaj inters. postmarkojn.

= REGIEA DOBROROSKA, ul. Klonauricza 24 m. 1 Gdansk. iVrzeszc®, Poljandb, 17-jara studentino, dez. kor. pri hemio, fiziko, Jaistorio, muziko kaj filatelio.

= SEKOASKI ZDZISLAW, Stara Wies, pow. Brzgzów, woj. Rzeszow, Pollando, 24-jara, sercas korespondantinojn en Ĉeĥoslovakio.

R U M A N I O :

= ZAGKT ALEKSAEDROjStr. Shakespeare 14. Oradea, Rumanio, 19-jara studento de muziklernejo dez. kor. kun junularaj muzikistoj, laŭeble aldiviolonistoj.

S O V E T U N I O :

= /T. PURINŜ, s. n. Vecogre, Ogres rajons Murnieki Latvia S3R, dez. korespondi.

= E. ZAKA3AN3KIS, poste restante, Kigo, Latvia SSR, librotenisto, dez. kor. per PI kun Ĉ. I. ; certa respondo.

= emeritaj instruistinoj ukrainaj tre deziras korespondi kun plenaĝaj inteligentaj virinoj/precipe instruistinoj /individue aŭ kolektive/. Adreso: V. Pimenov, ul. Oktjabrska pl. 6/11, Dnepropetrovsk 27. U33R.

'= B0RI3 ŜCAVINSKIj, str. Savuskina 1, kv. 15, Leningrad F-lo3, U33R, kolektanto de arto-objektoj dez. kor. kun ĉ. l.

V J E T H A M I O :

= LUU-QUANG-THO, Esperanto So Tbi, Bo Kien Trúc, Vjetnamio, 24-jara, muzikisto. dez. kor. pri muziko, inters. muzikajojn, PK kaj artajn fotojn.

**BULTENO, informilo de Esperantista Klubo en Praha, ĉe distrikta kultura domo
Praha 1. Eldonas OKD-Praha 1. Ĉefredaktoro: J. M. Havlik, Fr. Křížka
n-ro 12, Praha 7, telefono 73637
Administrejo: Týnska ulice 3, Praha I. Staré Město.**
